

Lingva Identeco

La serĉado de identeco emas fari la lingvon unu el la plej decidaj identecaj fundamentoj, pravigante la uzon de la esprimo "lingva identeco". La lingva identeco estas antaŭ ĉio la matrica lingvo, kiu estas komuna al ĉiuj individuoj de unu sama komunumo aŭ civilizo.

Sed la demando, kiu delonge leviĝas tra furoraj libroj, amaskomunikilaj konversacioj kaj eĉ en niaj ĉiutagaj vivoj, estas *Ĉu lingvo estas la centra marko de popola identeco?*

Ĉu lingvo havas identecan rolon? Lingvo havas rektan ligon al konstruita identeco. Estas klare, ke lingvo estas necesa por la konstituo de kolektiva identeco. Lingvo garantias socian koherecon en komunumo.

Lingvo respondecigas nin pri pasinteco, igante nin solidaraj kun tiu ĉi. Ĝi faras la identecon de popolo. La lingvoj estas akiritaj nature kaj ili estas ankaŭ instruataj formale. Estante tiel delikata kaj deveninta de homoj la lingvo, same kiel homo suferas diferencojn kiam ĝi kontaktiĝas kun alia. La maniero diri Lingva Identeco en la franca diferencas de LINGVA Identeco en Esperanto.

Lingvoj estas akiritaj nature kaj instruataj laŭ formala maniero. Ĉu la lingva identeco ĉefe afrika renkontas kolizion kun fremdaj lingvoj? Unuavide, la lernado de fremdaj lingvoj krom la matrica ebligas al ni konatiĝi kun alia civilizo kaj dialogi kun aliaj popoloj.

Ĉiuj fremdaj lingvoj ĉiam estis nur devigo aŭ altrudo, do ŝoko de lingva civilizo. Tiel la disvastiĝo de etnaj lingvoj estas la ĉefa prioritato.

La subevoluo de Afriko estas sur ĉiuj lipoj. Ĉi-tiu fenomeno estas ligita al pluraj faktoroj, sed postulas pli da ebloj el kiuj la valorigo de la nacia lingvo konsistigas, laŭ nia opinio, la ĉefan prioritaton. La ekzemplo de Sékou Touré en 1968 realigita dum la sekvaj dek ses jaroj: la gvineaj lernantoj devis frekventi la bazlernejon per loka lingvo, sed la franca estis studobjekto nur ekde la tria klaso de la duagrada lernejo. Post tio, ke ĉiuj studobjektoj estu instruataj en la franca, la lernado de loka lingvo devus esti deviga. Kaj la kreado de fakultatoj de niaj lokaj lingvoj montriĝas grava en niaj altlernejoj.

Finfine, estas dum la tuta vivo, ke novaj identecoj kaj novaj lingvoj aŭ diversaj lingvoj akiriĝas. La konscio pri plurlingveco helpe de lernejaj instruistoj estus do utila por ni lernantoj. La disvastigo de niaj afrikaj lingvoj estus necesa por nia disvolviĝo, sed la lernado de aliaj lingvoj ankaŭ utilas al ni por ligi prilingvajn kaj sociajn rilatojn.

Skribas Mélonékou Kossi A. Laurent